

Eŭropa Bulteno

**Sendependa esperantlingva ret-bulteno
por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo**

5an de septembro de 2000. N-ro 9

Redaktas:

Umberto Broccatelli - Prezidanto de Euxropa Esperanto-Unio
Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio
u.broccatelli@tiscalinet.it, tel./fakso +39-0687135019

"Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj sxtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazajxoj kaj kontrauxiri la sperton akumulitan de la tempo" Hamilton, The Federalist

* * * * *

Tiu cxi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri Euxropa Esperanto-Unio (EEU-informilo) kaj pri la euxropa agado de la Esperanto-movado gxenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de euxropa unuigxo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (Euxropa debato). Kiu deziras ricevi gxin, tiu sin anoncu al la ret-adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>; same se oni ne plu deziras ricevi gxin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

EEU - INFORMILO

AGADO POR LA KONSTANTA KONFERENCO PRI LINGVOJ

De Italio

Ĝis nun ni ricevis aliĝojn de ses eŭrodeputitoj:

Massimo CARRARO,

Antonio DI PIETRO,

Enrico FERRI,

Mario MANTOVANI,

Pasqualina NAPOLETANO,

Gianni VATTIMO (kiu estas universitata profesoro en Torino)

kaj de sep universitataj profesoroj (krom prof. Gianni Vattimo):

Prof. Francesco GUI, Roma "La Sapienza", (Moderna historio)

Prof. Giordano FORMIZZI, Verona (emerito), (Pedagogio)

Prof. Carlo MINNAJA, Padova, (Matematika analizo)

Prof. Fabrizio PENNACCHIETTI, Torino, (Semidaj lingvoj)

Prof. Luciano CANEPARI, Venezia, (Fonetiko)

Prof. David MEGHNAGI, Roma Tre, (Lingvoj)

Prof. Sergio BALDI, Napoli, (Afrikaj lingvoj)

ĈU EEU-OFICEJO EN BRUSELO?

La temo estos diskutata en kunveno de la interesuloj okazonta ĉe UEA en Roterdamo la 25an de novembro. Intertempe estas okazanta vigla ide-interŝanĝo pere de la diskutlisto europa@eGroups.com, al kiu oni povas aliĝi alirante la ejon: www.egroups.com/group/europa

2001 EŬROPA JARO DE LA LINGVOJ

Anna RITAMÄKI anna.ritamaki@kolumbus.fi estas taskita de EEU pri la Eŭropa Jaro de la lingvoj. Interesuloj povas viziti la TTT-ejon <http://www.egroups.com/group/Jaro-de-lingvoj-2001>.

LA ĈARTO DE LA FUNDAMENTAJ RAJTOJ DE LA UNIO

La Konvencio rete publikigis sian finan planan Ĉarton de Fundamentaj Rajtoj, kiu estos diskutata de Eŭropaj ĉefoj en la Biarritz-a renkonto la 13/14an de oktobro (legebla ĉe <http://www.europarl.eu.int/charter/en/default.htm>). La Konvencio (reprezentantoj de la EP, de la Komisiono kaj de la naciaj parlamentoj) adoptis finan plantekston ĝuste antaŭ la kunsido de la Eŭropa konsilio en Biarritz. Kvankam ĝi nun specife mencias ke la Unio devas respekti lingvan diversecon (artikolo 2), la plana Ĉarto de Fundamentaj Rajtoj aliloke malfermos la vojon al plia lingva malegaleco. Ĝi ne plene povos defendi lingvan egalecon en Eŭropa Unio. Bedaŭrinde ne plu eblas proponi amendojn. Tiel Esperantujo maltrafis ŝancon kontribui al la debato. Eĉ ne unu esperantista asocio partoprenis la Publikan Aŭskultadon en Bruselo en aprilo. Nur sporade, je nacia nivelo, kelkaj Esperantistoj partoprenis en debatoj pri la Ĉarto. La plej grava manko estas la parto de la Ĉarto kiu pritraktas la instancojn de la Eŭropa Unio. Artikolo 39 tute ne sufiĉas el vidpunkto de lingva egaleco. Punkto 4 de artikolo 40 (rajto je bona administrado) tekstas tiel: "Ĉiu havas la rajton skribi al instancoj de la Unio en unu el la lingvoj de la Traktato kaj havi respondon en tiu sama lingvo". Tiu artikolo nur traktas skriban komunikadon kaj tute ignoras aliajn manierojn de komunikado. Ĝi ankaŭ ne mencias egalecon inter la lingvoj. Informoj pri Alvokoj por Projektoj ofte nur estas angle aŭ france. Malfrua respondo al informpeto en "malpli grava" lingvo ofte signifas ke ne eblas trafi datlimon por Alvokoj. Post pligrandiĝo ĉi tiu problemo fariĝos pli grava. (Dafydd ap Fergus)
[http://www.europarl.eu.int/charter/activities/docs/pdf/en/convent47_en .pdf](http://www.europarl.eu.int/charter/activities/docs/pdf/en/convent47_en.pdf)

KIU VOLAS INDIVIDUE SUBTENI EEU-n?

Kiel konate, Eŭropa Esperanto-Unio estas kunordiga organizo el Landaj Esperanto-Asocioj en la kadro de Eŭropa Unio. Kelkaj sugestis ke EEU iĝu asocio el individuoj aŭ almenaŭ havu ankaŭ kategorion de individuaj membroj. Do, eksperimentociele, oni decidis ke individuoj, kiuj havas intereson pri la agado de EEU, favoras ĝin kaj volas kontribui al ĝi kaj esti regule informataj pri ĝi, povas esprimi sian apogon aliĝante al la listo de la "Simpatiantoj de EEU". Tion oni povas fari sendante almenaŭ 20 eŭrojn al la kasisto de EEU (s-ro Hans Ten Hagen, Middenweg 587 1704 BH HEERHUGOWAARD, Nederlando) pere de la UEA-konto eece-p. Simpatiantoj de EEU rajtas ricevi paperan version de Eŭropa Bulteno. Se oni ne deziras ricevi la paperan Bultenon (ĉar oni jam ricevas ĝin per e-poŝto), sed oni volas enskribiĝi inter la "simpatiantoj de EEU", tiam sufiĉas kotizo de 10 eŭroj. Kompreneble pli altaj kontribuoj estos ĉiam bonvenaj. Bedaŭrinde ĝis nun la aliĝoj estis tre malmultaj: unu el Nederlando kaj ses el Italio. Ĉu la landaj asocioj ne informis siajn asociojn pri tiu ĉi ebleco? Ĉu eŭropaj esperantistoj vere ne havas intereson al EEU?

PRI LA ENHAVO DE TIU ĈI BULTENO

En reta diskuto travideblis kritiko al tiu ĉi Bulteno, kiu laŭdire tro multe parolas pri "federalismo" kaj pri "demokratio". Ni volas rimarkigi, ke, ĝuste por havi liberecon paroli ankaŭ pri tiuj ĉi temoj, tiu ĉi Bulteno estas dividita en du partoj EEU-INFORMILO kaj EŬROPA DEBATO. La unua parto donas informojn pri esperanto-agado en EEU: se ĝi ne estas abunda, tio signifas ke ne estas multo raportinda. La dua parto estas libera forumo, en kiu oni povas debati ĝuste pri la rilato inter la internacia lingvo kaj la konstruo de unueca Eŭropo.

EŬROPA DEBATO**PRI LA ENHAVO DE TIU ĈI BULTENO**

Kion signifas Unueca aŭ Unuigita Eŭropo? ĉu Eŭropa Unio fariĝos Federacio? ĉu tio estas dezirinda? kial konstruo de Unuigita Eŭropo devus interesi la esperantistojn? Jen estas demandoj, kiujn oni povas, eĉ devus, debati en tiu ĉi parto de nia Bulteno. La vorto "federalismo" estas perceptata de kelkaj kvazaŭ obscena vorto, ĉar ĝi malrespektas la sanktan suverenecon de la naciaj ŝtatoj. Jes ja, tiun saman suverenecon, kiu donacis al la Eŭropanoj en la unua duono de la baldaŭ finiĝonta jarcento du terurajn mondmilitojn. Je la nomo de la idolo "naci-ŝtata suvereneco" milionoj da homoj mortis sur la batalkampoj kaj la malmultaj kiuj rifuzis tion estis konsiderataj kiel perfiduloj. La nuna Eŭropa Unio estas akuzata je tio, ke ĝi estas regata de burokrataro ne respondeca antaŭ la popoloj, kaj ke ĝi estas tro dependa de Usono, militiste, ekonomie kaj ankaŭ kulture. Tio estas grandparte vera, sed la solvo ne estas reiri al la diseco de malligitaj naciaj ŝtatoj, kiuj estas eĉ malpli demokrataj, ĉar ne kapablaj plenumi la taskojn, kiujn ili devus plenumi por siaj civitanoj; kaj eĉ pli dependaj de Usono, ĉar pli malfortaj kaj konkurencantaj unu kontraŭ la alia. La solvo estas havi pli da Eŭropo, ne male. La unueca monunuo bezonas registaron malantaŭ si, registaron, kiu esprimu difinitan ekonomian politikon; registaron, kiu kapablu defendi sian monunuon, kiam tio estas necesa, do ne dependi de la bonvolo de la Usona "Federal Reserve" aŭ de la Usona Prezidento. Pri kultura dependeco de Eŭropo rilate al Usono esperantistoj havas ion por diri. Vidu ekzemple la sekvantan artikolon de A. Chiti-Batelli, baldaŭ aperontan en l'esperanto, organo de IEF.

TEME PRI "LINGVA IMPERIISMO": DENOVE PRI LA ILUZIECO, KIEL RIMEDO AL ĜI, DE MULTLINGVECO POR ĈIUJ

Tove Skuttnab-Kangas, Linguistic genocide in education - or worldwide diversity and human rights?, Mahwah (New Jersey), Lawrence Erlbaum, 2000, p. XXXIII, 785.

"Rudis indigestaque moles"

(Ovidio, Metamorfozoj, I, 7)

Tiu ĉi volumo de la konata dana lingvodidaktikistino estas impona kolekto, kun novaj kaj interesaj dokumentoj kaj temoj, de ĉio, kion oni skribis pri la risko de malapero, de kiu estas minacataj la plej multaj minoritataj lingvoj ankoraŭ nun ekzistantaj en la mondo; kaj minacataj, precipe, de la imperiisma efiko estigata, specife en la edukado, fare de la angla lingvo (kiu manifestiĝas, aldonas mi, ankaŭ kontraŭ la pli disvastigitaj lingvoj, kiuj plu iluziiĝas esti, nune, ekster danĝero).

Sed, malgraŭ la tre zorga diligenteco de la aŭtorino, la riĉeco de la argumentado, la abundo de la dokumentado kaj la vasteco de la fina bibliografio, tamen la verko - kvankam ĝi estas multvalora por livero de la "kadro" de la situacio kaj de ĝia severeco, kune kun la ĝenerala malatentado kaj subtaksado de la fenomeno - lernigas al ni nenion fundamentan, kontraŭe, pri la efikaj rimedoj kontraŭ la malsano (ankaŭ ĝi ne kapablas iri preter la proponon, tute ne novan, pri du- aŭ plur-lingveco, trudota eĉ al tiuj kiuj parolas dominantajn lingvojn), ĉar ĝi ŝajnas ne adekvate konscii pri tio ke:

1) la domina efiko de unu lingvo super alia estas konsekvenco de malegaligo kaj hegemonia premo fare de politika povo havanta pli grandajn dimensiojn kaj ekonomian kaj kulturen pezon, kaj do ĝi ne estas korektebla, krom malbone kaj parte, se ne estas korektita tiu malegaleco, per la estigo de adekvata kontraŭ-povo;

2) la mondo pli kaj pli bezonas unuecan komunikan lingvon (lingua franca) por ĉiuj (tio ĉi estas la fundamenta postulo),

3) kaj, se tiun ĉi rolon plu ludos vivanta etna lingvo, (eĉ pli malbone se parolata de multaj milioncentoj da homoj kaj en ĉiuj mondpartoj), la fenomenoj de lingvovorado timataj de la aŭtorino, ne nur ne povos esti, se ne haltigitaj, almenaŭ malplirapidigitaj, sed ili povos nur kreski, laŭ rapideco kaj intenseco;

4) nur lingvo kiu estu hejma por neniuj popolo (kiel mortinta lingvo aŭ lingvo elpensita) ne havas, aŭ havas en ege malpli granda mezuro, la detruan efikon antaŭe diritan.

5) Estas tio ĉi - unueca komunika lingvo tutplaneda, kiu ne estu lingvovora kaj metu ĉiujn sur egalecan nivelon - la objektivo samtempe adekvata al la celo kaj konforma al la bezono de la moderna mondo, de plena travidebleco de la internacia komunikado. Kontraŭe la "multlingveco por ĉiuj" ignoras tian tezon, kaj ĝi restos do senutile komplika kaj vana mito (kaj ankaŭ nerealigebla), ĉar malhava je politika subteno, kaj ĝi servos nur por deturni la atenton for de la objektivoj kaj de la rimedoj validaj por transpaŝi la "senparolecon" de la malpli favorataj klasoj kaj popoloj, kaj do korekti ilian nuntempan situacion de lingva malsupereco.

Konklude, la sola utila instruo, kiun oni povs eltiri el verko kiel ĉi tiu - kvankam esence dediĉita al temoj strikte pedagogiaj-lingvaj fare de lingvo-didaktikistino - estas tio, ke la lingva hegemonio, precipe je internacia nivelo, iras longe trans la efikon detruan al dominataj lingvoj kaj kulturoj: ĝi portas kun si politikan hegemonion, ekonomian ekspluatadon, daŭran submetitecon de la pli malfortaj kaj pli malriĉaj al la pli potencaj kaj pli riĉaj, en malvirta cirklo, pri kiu la difino "lingva imperiismo" ne estas troigita.

* * *

Sed la indiko, eĉ ekzakta kaj detala, de la kaŭzoj de malsano estas nur antaŭ-kondiĉo - necesa, sed nesufiĉa - por forigi ĝin. Por atingi tiun celon bezonatas terapio kiu iru ĝis la radiko de la malsano, kaj ne limigu sin je kuracado de ties simptomoj: nome necesas, en nia kazo, estigi kontraŭ-povon, kiu havu precizan intereson propran kontraŭbatali kaj neŭtrigi la minacon imperialisman supre diritan, danke al propra komunika lingvo kiu - pro siaj superaj kvalitoj, kunigitaj kun la pezo de tiu nova

politika subjekto - povu en dua tempo sukcesi ankaŭ kiel komunika lingvo tutplaneda.

Bedaŭrinde tio estas problemo, kiun la aŭtorino eĉ ne proponas al si. Certe, ŝi ne ignoras la ecojn de esperanto, al kiu ŝi dediĉas kelkajn paĝojn (p. 280-284), deklarante ĝin, malemfaze, preferinda al la angla kiel internacia helplingvo. Sed poste ŝi tuj lasas fali la demandon - ŝia mencio estas simpla lip service (nome formalajo senkonsekvenco) - eĉ ne demandante sin kiel kaj je kiaj kondiĉoj povus okazi ŝanĝo tiom granda, destinita ŝoki interesojn, privilegiojn, hegemonian influon internaciajn tiel elstarajn ke ili estas malfacile venkeblaj sen precizaj kaj decidemaj plano kaj politika volo. En la restanta parto de la verko ŝi limigas sin aserti ke necesas doni pli grandan reliefon, inter la homaj rajtoj, al la lingvaj rajtoj, por eltiri el tio la pedagogiajn konsekvencojn, kiujn ni scias, pri la altrudo de multlingveco por ĉiuj (eĉ se varia - pri la instruendaj lingvoj - en la diversaj partoj de la planedo). Sed, se estas vere ke gravas kontraŭbatali la lingvan diskriminadon, bazitan sur la malvera konvinko ke ekzistas lingvoj "pli egalaj" kaj pli dignaj ol aliaj, tamen plu restas ke la decidiga punkto, la fundamenta demando - kondiĉanta ankaŭ tiun celon - estas la reekvilibrigo de la hegemonia pozicio, kiun hodiaŭ havas la angla (kaj en pli malgranda proporcio havas, en iuj partoj de la mondo, la franca, aŭ la hispana, aŭ la germana, aŭ la rusa, aŭ, en Fora Oriento, la ĉina). Al tiu ĉi reekvilibrigo, hic et nunc (tie ĉi kaj nun), povas hodiaŭ doni komencon, kaj en decidiga maniero - tion mi tezis plurfoje - la Eŭropa Unio, se ĝi sukcesos alpreni politikan dimension, federacian strukturon, konscion pri la propraj interesoj lingvaj kaj kulturaj kaj pri la koincido de ĉi tiuj kun tiuj de aliaj popoloj; kaj ĝi do kapablos elekti kiel federacian lingvon planlingvon (praktike nur Esperanto, hodiaŭ estas uzopreta).

Ne estas kuraĝige ke pri ĉio ĉi ekzistas nenia konscieco, eĉ nur malpreciza kaj komenca, eĉ ne ĉe valora studentino kiel s-ino Skuttnab-Kangas. Kaj tio des pli malĝojigas, tial ke ŝi plurfoje alvenas ĉe la sojlon de tia konscieco, kiam ŝi ripetas - ankaŭ je la fino de sia impona volumo, referencante eĉ al Marx - ke demonstri kaj klopodi persvadi estas senutile, se al tiu ĉi intelekta laboro ne kuniĝas energia politika agado, kiu korektu, surbaze de preciza plano, la nunan situacion de unequal power (malegala potenco), kaŭzo unua de la lingva subpremado.

Ĝuste je tiu ĉi punkto tamen al la aŭtorino - kiu tute ignoras la aŭtorojn, kiuj okupiĝis pri etnopolitiko kaj ĝenerale pri etna federismo, sub- kaj super-naciŝtata, kiel Guy Héraud - mankas la instrumentoj por disvolvi tion, kio restas, en ŝia volumo, intuicio esprimita en kelkaj linioj kaj nur ekvidetita objektivo. Tiel ŝiaj pli ol 800 paĝoj finiĝas ĝuste tie, kie la verko povintus komenci esti reale interesa kaj diri ion vere novan.

Ŝi citas, ja vere, en la vasta fina bibliografio (preskaŭ tute anglalingva, spite al la laŭdegata multlingvismo) la eseon, niaopinie fundamente gravan, de Louis-Jean Calvet, *Linguistique et colonialisme* (Parigi, Payot, 1974); sed ŝi ne montras esti kompreninta ĝiajn politikan signifon kaj novecon, t.e. la argumentadoj, kiuj kuŝas je la bazo ankaŭ de niaj sugestoj: la politiko, hegemonia politika povo fere kondiĉas kaj daŭrigas la lingvajn ekvilibrojn - aŭ prefere misekvilibrojn, kiuj ajn estu la adoptitaj eduk-politikoj; misekvilibroj nemedifeblaj, se oni antaŭe ne korektas tiun hegemonion.

Hic Rhodus, hic salta, ("tie ĉi estas Rodo, tie ĉi saltu") diris la antikvuloj. Kaj la Angloj ripetas: first things first ("unuaj aferoj unue",

nome "pli gravaj aferoj estu unualoke"). Dum Danto aldonas: i vostri non appreser ben quell'arte (la viaj ne bone lernis tiun arton).

Andrea CHITI-BATELLI

(1) Oni devus aparte atentigi la multajn eŭropistojn, kiuj trovas memkomprenebla kaj eĉ dezirebla la aliĝon de Turkio al la Eŭropa Unio, pri la paĝoj, en kiuj estas vaste priskribitaj la laŭsistema genocido, fare de tiu lando, ne nur de la kurda lingvo sed de la kurda popolo mem (p. 321 kaj sekvantaj.).

(2) Tio estas la tezo tre profitkonvena (kaj tute utopieca) de ĉiuj lingvo-didaktikistoj, al kies pledado estas destinitaj ankaŭ la aktoj de internacia kongreso ilia - prizorgitaj de la sama Skuttnab-Kangas, al kiu oni ŝuldas ankaŭ pli vastan kaj konkludan kontribuon - kolektitaj en la volumo, kun nemiskomprenebla titolo Multilingualism for all, Lisse (Nederlando), Swets kaj Zeitlinger, 1995. La akre korporacia spirito de la lingvo-didaktikistoj neniam dementiĝas, maskante sin sub ĉiuj pretekstoj, ŝajne la plej noblaj kaj neprofitemaj.

(3) Dum la plej multaj havas nek personan inklinon nek faktan intereson al plurlingveco; do estas almenaŭ troigite, konsideri ĝin - ekster apartaj situacioj - kiel "homan rajton", aŭ eĉ unu el la plej esencaj homaj rajtoj.

(4) La federistoj aldonas ke la Eŭropa Federacio elvokos per sia ekzemplo - kaj devos kuraĝigi - la formiĝon de grandaj Federacioj kun kontinentaj dimensioj ankaŭ en aliaj kontinentoj, kaj ke tio konsistigos fundamentan kontribuon, nepre necesan, al la elaĉeto de la Tria Mondo kaj al la malpligrandigo de la plej gravaj malegalecojn, kiuj afliktas la planedon. Tiu ĉi do - kaj ne la multlingveco por ĉiuj - povas esti la vojo, eĉ se longa kaj malfacila, al malpli maljusta kaj pli ekvilibra mondo. Nur tia politika reekvilibrigo igos konkrete ebla, kaj ne iluzie pretenda, la deziratan lingvan reekvilibrigon.

Andrea

CHITI-BATELLI

LA MANIFESTACIO EN NICO

Informojn pri la manifestacio oni povas trovi en la ejo <http://www.mfe.it>. En ĝi klakante en la unua paĝo oni povas trovi anglalingvan programon de la manifestacio.

Grupoj kiuj volas partopreni turnu sin al:

"Youth for Nice 2000" Steering Committee - Organisational Secretariat: c/o JEF
Place du Lŭembourg 1 - B-1050 Brŭelles

e-poŝto: secretariat@jef-europe.org - Tel. +32-2-512.0052, faks. +32-2-512.6673
(Noto: JEF = eŭropa federalista junularo)

Pagante partopren-kotizon de 50 eŭroj oni povas ricevi paketon inkluzivantan:

* 2 noktojn en malmultekosta hotelo en Nico (1/4aŭdon la 6an de dec. kaj vendredon la 7an)

kun matenmanĝo (ĉiuj hoteloj estas en la centro de Nico);

* aliron al ĉiuj eventoj (Junulara Konvencio, publika manifestacio, forumo de NRO-oj);

* pakitan tagmanĝon por vendredo la 7a de decembro, inter la Junulara Konvencio kaj

la Civitana Manifestacio;

* aliron al la "Europe's Party" en la vespero de la 7a de decembro.

POR ORGANIZITAJ GRUPOJ VOJAĜANTAJ PER PROPRAJ BUSOJ, TRAJNOJ AŬ FLUGOJ (SE NE POVANTAJ TROVI LOKAN FINANCAN SUBTENON) JEF POVAS DONI KONTRIBUOJN ĜIS 80% DE LA KOSTOJ, KUN MAKSIMUMO DE: 2500 ĉ por grupo de 50 aŭ pli da homoj; 2000 ĉ kun 40-50 homoj; 1500 ĉ kun 30-40; 1000 ĉ kun 25-30. En specialaj kazoj (reprezentatoj de organizoj k.a.) JEF povas doni kontribuon ankaŭ al individuoj. La disponebla mono estas limigita, do rapidu anonci vin. Sendu vian aliĝon kiel eble plej baldaŭ., indikante: nomon kaj antaŭnomon, sekson, naskiĝdaton, organiza1/4on reprezentatan, urbon, landon, ret-adreson, faks-numeron, kaj sendante la aliĝ-kotizon.

ESPERANTISTOJ NE FORESTU EN TIU ĈI GRAVA EVENTO!